

Raportoj
de
landaj
sekcioj
de **ILEI por**
2011

Kompilis: Trezoro, Stefan MacGill,
Aprilo, 2012



ENHAVTABELO

(*Nota: la ruĝa koloro signifas ke ne venis raporto, la brazila sekcio promesis ke li raportos, aliaj silentas*)

Albanio	2
Aŭstralio	4
Belgio	6
Benino	7
Brazilo	8
Burundo	9
Ĉeĥio	10
Ĉinio	11
Danio	14
Finnlando	15
Francio	16
Germanio	18
Hungario	21
Italio	23
Japanio	25
Kataluna Sekcio – Hispanio	27
Korea Respubliko	28
Kroatio-KEU	29
Kroatio-UPE	30
Kubo	31
Meksiko	33
Nederlando	34
Norvegio	36
Pollando	37
Rumanio	38
Serbio	40
Svedio	41
Svislando	42
Togolando	44
Ukrainio	45
Usono kaj Kanado	47

ENKONDUKO

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) havis 31 landajn sekciojn oficiale aligitajn en la jarfino de 2011. Dum la 44a ILEI-konferenco en Kopenhago en julio 2011 la komitata kunveno kun bedaŭro laŭstatute nuligis tri landajn sekciojn: en Rusio, Britio kaj Irano, kiuj ne aktivis dum du jaroj, kaj feliĉe akceptis novan meksikan sekcion. Mongolio en la jarfino de 2011 fondis landan sekcion kiu povos aliĝi en 2012; similaj planoj estas ĉe Vjetnamio. Ĉiuj landaj sekcioj devas raporti al estraro pri la agado dum la antaŭa kalendaro jaro, antaŭ la 31a de marto en la sekva jaro. Ĝis la 30a de aprilo, 27 landaj sekcioj raportis jarlaborojn al la estraro de ILEI. La raportintaj sekcioj atingis rekordan nombron (19 en 2008, 21 en 2009, 18 en 2010). Kvar landaj sekcioj ne raportis, tamen ni iumaniere ricevis informojn ke la sekcioj vive aktivis.

Trezoro sekretario de ILEI
Stefan MacGill prezidanto de ILEI

La 24an de aprilo 2012

Albanio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Albana Esperanto Instituto- AEI

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Instituti Shqiptar I Esperantos ISHE

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1991/1993

Jura statuso: Aktuale ankoraŭ ne renovigita ĉe la juĝejo

Rilato kun Landa Asocio de UEA: Integra parto

Membro-nombro fine de 2011: Sume 6. Detale paperaj 0, retaj 6, aliaj (HM,DM) 0.

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 1

Oficiala hejmpaĝo: albanajesperantistoj@yahoo.com

Oficiala ret-adreso: bselimi@gmail.com (Sekretario)

Retgrupo: ne

Revuo sekcia: Bulteno de la Albana Esperanto Instituto- (elektronikforme, dumonata, nun pretiĝas numero 100)

Enlanda membrokotizo: 500 L= 3.5 euroj

Nuna estraro de la sekcio: Doc. Vasil Pistoli, vasilpistoli@yahoo.com; Bardhyl Selimi, bselimi@gmail.com; Rita Permeti, ritapermeti@yahoo.com

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj:

Jam eksvalidiĝis tri jara.

=== **Agado** ===

Propraj aranĝoj dum 2011:

Eldono de la dumonata elektronika Bulteno, kampanjo por starigi kursojn en la ŝtata Tirana Universitato, partopreno en internaciaj aranĝoj, intervjuadoj en TV-kanaloj por sentemigi la publikan opinion pri Esperanto, pretigo por reldono de la klasika esperanta historia libro albana pri nacia heroo Skanderbeg (unua eldono en la jaro 1929), starigo de reta Esperanto kurso kun gestudentoj en Albanio kaj Kosovo, traduko el Esperanto de la libro *Trezoro Araba* de Hussain Al-Amily, traduko en Esperanto de la renoma albana romano *Hunda Hauto* (Lekura e Qenit), klopodoj por starigi kontaktojn kun la Unesko-oficejo en Albanio.

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

Staĝo en Alzas Loreno, aprilo 2011

Propraj projektoj dum 2011:

Starigo de E-kursoj en Socia Universitato de Tirana, en ŝtata Universitato de Shkoder, en Universitato de Tetovo (Makedonio), en Universitato de Priŝtina (Kosovo), en la urbodomo de Tirana, emisiado de poŝtamarkoj far Albana Poŝtoservo je temo Esperanto, atendo de 16-membra esperantista grupo pola aprile 2012 okaze de promovigo de la romano *Hunda Haŭto*, reldono de la romano Gjergj Kastrioti- Skanderbeg - nacia heroo de Albanio en Esperanto (aŭtoro Cuk Simoni), revigliĝo de tutnacia esperantista asocio kaj mem ILEI-sekcio por Albanio sekvata de renovigo de la ties leĝa statuso.

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

Klopodoj por kunlabori kun Unesko-oficejo en Albanio, kun la Albana Poŝtoŝicejo, kun la urbodomo de Tirana.

Konata E-instruado en via teritorio:

Reta E-kurso kun gimnaziaj kaj universitataj gestudentoj.

Memoru, ke la oficiala registro-loko de ILEI por ĉiuspecaj kaj ĉiunivelaj kursoj estas ĉe nia partnero <edukado.net>. Tre gravas raporti tie ĉiujare ĉian instruan agadon – tion vi facile faras per reta respondilo. La rezultoj estas videblaj en traserĉeblaj tabeloj kaj sur interaktiva mapo!

Aŭstralio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: ILEI-Aŭstralio

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1997/1997

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011: 5

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 1 /

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso: ne

Retgrupo: ILEI-Aŭstralio@yahoogleroups.com

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrokotizo:

Nuna estraro de la sekcio: Jennifer Bishop, 24/8 Wallen Rd., AU-3122 Hawthorn VIC, esperanto@education.monash.edu.au

=== *Agado* ===

2011 - Pozitivaj Paŝoj en Aŭstralio

Aŭstralio fieras pro la du faktoj ke tra la tuta vasta lando estas parolataj ĉiutage proksimume 200 lingvoj, kaj ke troviĝas granda diverseco de popoloj indiĝenaj kaj enmigrintaj en ĉiu ŝtato. Tamen la nacia lingvo estas la angla parolata per multaj akĉentoj. Bedaŭrinde, pro ĉi tiu fakto kaj la neceso koncentriĝi pri la angla, tre malmultaj personoj volas reteni sian gepatran lingvon nek lerni pluan naturan lingvon nek Esperanton. Ili tute ne komprenas la valoron de regula, speciale kreita lingvo kiu ne nur ebligas interkomunikadon internacian kaj interkulturan, sed ankaŭ protektus la diversecon de nia popolo en Aŭstralio.

Por raporto de 2011 eblas danki al 5 ILEI-sekcianoj, fidindaj instruistoj en preskaŭ ĉiu ŝtato kiuj daŭre serĉas, instruas kaj aranĝas komunumajn renkontiĝojn por ebligi la plibonigon de la parolata lingvo. Tamen la kutima, bone subtenata AEA Somerkursaro ne okazis pro la decido transdoni financojn al centjara Jubileo de la Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Adelajdo. Danke al pluraj tre dediĉitaj kunlaborantoj kaj vizitantoj ĝi bone sukcesis.

En SudAŭstralio okazis la plej diversa programo: En Adelajdo 10-semajna kurso por komencantoj, individua instruado ĉe la hejmo de du tre kompetentaj esperantistoj, de instruisto al liaj arablingvaj studentoj, kaj instruado kvinjara de la instruisto de unu klaso de ŝtata baza lernejo.

En Kvinlando, Komisiito pri Korespondkurso servo vendis nur du kursojn 'by Direct Method' de Stano Marĉek, kaj unu laŭ 'Detektivu per la Krime de Katrina' de Katalin Kovats, sed per respondo al perreta demando eblis vendi libron por hejminstruado. Instruistino en Toowoomba, kun helpantino aranĝis mallongan kurson ĉe biblioteko, kaj geedza paro estas instruata antaŭ la komenco de ĉiumonata kunveno.

En Viktorio pro daŭra miskompreno inter kluboj mankis konkreta programo de instruado. Ĉe ĉiusemajnaj kluboj la malgranda nombro da membroj interparolis pri gramatiko kaj aliaj aferoj. En unu urbo okazis ĉiumonata programo kiu inkluzivis ekzercadon de Esperanto.

En Okcidenta Aŭstralio, per la helpo de entuziasma esperantistino lernas grupo per “Step by Step” de Montagu C. Butler.

En NovSudKrimrio troviĝas Esperanto-Domo kie renkontiĝas membroj kiuj ankaŭ gastigas ĉe la bone ekipita loĝejo. Tamen pri instruado mi ne havas informon. AEA ankoraŭ subvencias instruistaron, ILEI-sekcion, kiu kreis novan inspirigan kurson kun lernolibro por instruistoj de bazaj lernejoj en anglaparolantaj landoj ‘Talking to the Whole Wide World’ (Parolanta kun la tuta vasta mondo) de Penny Vos, kiu nun aranĝas tradukadon en aliajn lingvojn por ĝin eksporti. La ĉefa celo de la kurso estas prezenti al bazaj lernejoj meti-lingvolernadon, (ALL) - ‘Apprenticeship Language Learning’, kiu per ĝia sukceso devus kuraĝigi lernantojn de bazaj lernejoj plezure elekti pluan lingvon por lerni en duagrada lernejo. Tamen unue necesas konvinki la lernejestrojn pri ĝia valoro. Lia/ŝia tasko estas trovi entuziasmajn ĝeneralajn instruistojn de sia lernejo, por lerni kaj samtempe instrui al la infanoj, same kiel jam pri ĉiuj aliaj fakoj en bazaj lernejoj.

‘ALL – Apprenticeship Language Learning’ de Penny Vos estas prezentita al la landa registaro por enkonduki en la novan nacian studprogramon por lingvoj. Ni ankoraŭ atendas finan respondon por scii, ĉu estos loko por instrui Esperanton per ALL, eble almenaŭ en kamparaj lernejoj, al kiuj mankas ebleco trovi instruiston de alia akceptita lingvo.

Per ĉi tiu tre akceptinda programo por tuta Aŭstralio kaj per la propono de jubilea 125 kurso sendita al pluraj universitatoj kaj kolegioj, ILEI-sekcio de Aŭstralio kaj AEA esperas almenaŭ vaste komuniki pozitivan informadon pri la valoro de Esperanto.

Belgio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: ILEI BELGIO

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA: kunlaboranta kun FEL - demando estis farita al Belga Esperanto Federacio (BEF) por iĝi sekcio de BEF. BEF parolos pri la afero dum la ĝenerala kunveno en 2013.

Membro-nombro fine de 2011: Sume 10. Detale: paperaj 7, retaj 3, aliaj (HM,DM) 0.

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 1/1 Marc Cuffez.

Oficiala hejmpaĝo: ne.

Oficiala ret-adreso: ne

Retgrupo: ne

Revuo sekcia: ne.

Enlanda membrokotizo: 22/12 euroj (2 por la landa agado)

Nuna estraro de la sekcio: sekciestro Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende. marc.cuffez@telenet.be

==== **AGADO** ====

PROJEKTOJ DE ALIAJ EN KIUJ LA SEKCIO KUNLABORIS:

FEL HAVAS PROJEKTON PRI "LINGVO-LANĈILO (SPRINGBOARD TO LANGUAGES) KAJ LA UNUJAJ KURSOJ JAM KOMENCIĜIS FINE DE 2011.

ALIAJ ATINGOJ EN 2011

2 MEMBROJ DE LA SEKCIO (SEKCIESTRO/KOMITATANO KAJ KIKI TYTGAT) PARTOPRENIS LA ILEI KONFERENCON DE KOPENHAGO. ANKAŬ 1 NE-MEMBRO DE ILEI PARTOPRENIS (HEIDI GOES).

Benino



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: ILEI-Benino

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011: 5

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 1 / ?

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso:

Retgrupo: ne

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrotizo:

Nuna estraro de la sekcio: Prezidanto: S-ro ALOFA Charles, Vicprezidanto: S-ro GBADAMASSI Latifou, Ĝenerala sekretario: S-ro GOKAN G. André, Kasisto: S-ro ZINKPE Benoit, Organizanto: S-ro TCHOUME Michel.

=== *Agado* ===

Post kelkjara dormeto, la Benina ILEI-sekcio revekigis dank' al S-ro Latifou GBADAMASSI, prezidanto de la Landa Asocio kiu, reveninte el Kopenhago, okazigis gravan kunvenon sabaton, la 3-an de septembro 2011 por renovigi la estraron de la sekcio. El tiu kunveno rezultis ke la tutnova estraro konsistas el kvin (5) personoj.

La estraranoj de la ILEI-sekcio mem jam kunvenis dufoje. Dum la kunvenoj diversaj gravaj punktoj estis pritrakitaj. Resume, temas pri laborplano por la jaro 2012 kaj eventuala kurso por progresantoj en decembro 2011.

LABORPLANO POR LA JARO 2012:

I- Seminario por mezuloj kaj progresantoj

II- Rondvojaĝo de la estraro tra kluboj enlande

III- Naciaj Ekzamenaj Sesioj

Brazilo



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Brazila Sekcio de ILEI (ILEIBR)

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1975/

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA: Sendependa

Membro-nombro fine de 2011:

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo:

Oficiala ret-adreso:

Retgrupo:

Revuo sekcia:

Enlanda membrokotizo:

Nuna estraro de la sekcio: sekciestro Leysester Miró, rua Jorge Tiburcia 592, Vila Mariana, BR-041-26001 Sao Paulo, leysester@gmail.com

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: 3 jara, la sekva elekto en majo 2013

=== Agado ===

(Promesis raporton, sed ne alvenis)

Burundo



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Burunda ILEI Sekcio (BIS)

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011: 5

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 1

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso: ne

Retgrupo: rundaj-esperantistoj@googlegroups.com

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrotizo:

Nuna estraro de la sekcio: sekciestro Jeremie Sabiyumva, BP 170, Rumonge, Burundo, jerrybs21@yahoo.fr

=== Agado ===

Propraj aranĝoj dum 2010:

Seminario en Bubanza por instrukapabloj

Propraj projektoj dum 2011:

Seminario kaj okazigo de la internacia ekzameno en Rumonge.

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

Helpo al disponigado de instruistoj en iversaj lernejoj.

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

Eksekurso dum la seminario gvidita de Mirejo.

Afiŝado de informoj pri Esperanto en diversaj mezgradaj lernejoj.

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

La Fondaĵo Hans subvenciis la seminarion.

Konata E-instruado en via teritorio:

Okazis instruado en 37 mezgradaj lernejoj, kaj la nombro de gelernantoj, ni ne povas nun ĝin disponigi kun precizo. Pri aĝoj, ĝi estas inter 13 kaj 24 jaroj. Uzitaj lerniloj estas lernolibro de Esperanto en Kirundi, franca, angla kaj Svahila

Aliaj atingoj en 2011

Kutimaj instrukursoj.

Ĉeĥio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Ĉeĥa sekcio de ILEI

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Česká sekce ILEI

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1991 / 1991

Jura statuso: sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Rilato kun Landa Asocio de UEA: integra parto de ĈEA

Membro-nombro fine de 2011: 6 (paperaj)

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 1

Retejoj kaj kontaktiloj sekciaj:

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso: melicharkova@quick.cz, apartenas al sekciestro

Retgrupo: ne, sekciestro dissendas mesaĝojn al membroj

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrotizo: 300 Kč, laŭ la kurzo restas proksimume 50 Kč

Nuna estraro de la sekcio:

sekciestro – Jana Melichárková

komitatano – Miroslav Malovec

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: 3 jaroj

=== **Agado** ===

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

instruado dum la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov

Wikimania de vikipedistoj en Svitavy

Seminario en Skokovy – lingvoinstruado kaj konversacio

Ilustrado de la libro Fabeloj por infanoj de Růžena Vlková – ilustris Miroslava Tomečková

Esperanto, fascinující jazyk - propaganda broŝuro.

Redaktado de bulteno dum IFEF-kongreso en Liberec

Ekspozicio *Otakar Březina kaj Esperanto* en Moravské Budějovice

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

korespondaj kursoj

Konata E-instruado en via teritorio:

diversaj kursoj

Praha – 12 lernantoj – pensiuloj, lernilo – S. Marček: Esperanto per rekta metodo, unufoje semajne

Svitavy – 5 infanoj, 3 plenkreskuloj, unufoje semajne

Ratíškovice – 12 lernantoj (7-10jaroj), lernilo – J. Melichárková: Esperanto por infanoj, unufoje semajne

Česká Třebová – 8 infanoj (8-13j.), lernilo – J. Melichárková: Esperanto por infanoj, unufoje semajne

Okříšky - infana grupo, eldono de libro Fabelputo de mia panjo (Kamila Bártlová)

Ĉinio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Ĉina sekcio de ILEI (ILEI-CN)

Nomo kaj mallongigo nacilingve: 国际世界语教师协会中国分会

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1988/1988

Jura statuso: ne

Rilato kun Landa Asocio de UEA: sendependa

Membro-nombro fine de 2011: Sume: 69. Detale: paperaj 20, retaj 49, aliaj (HM,DM) 0. (La nombro por 2012 jam atingis 80)

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 4

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso: arko.gong@qq.com (GONG Xiao-feng, sekciestro)

Retgrupo: QQ-grupo

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrotizo: RMB 100 por plenaj (ĉ. 11 EŬROj), RMB 50 (ĉ. 5.5 EŬROj) por retaj. Ni sendas la kotizojn al ILEI laŭ la valuto. Ni retenas tiom, kiom estas la restanta parto por landa agado.

Nuna estraro de la sekcio:

GONG Xiao-feng, sekciestro arko.gong@qq.com,

School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang Univeritato, CN-330031, NANCHANG, Ĉinio

LIU Bao-guo, vicestro kaj kumulanta sekretario de la sekcio;

verdakoro@yahoo.com.cn

ZOU Jin, Kasisto

Kamelo_z@hotmail.com

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: 3-jaraj, 2012 - dec. 2014,

=== Agado ===

Propraj aranĝoj dum 2011:

1). 2011.1.15-2.14, la_2a Vintra E-kursaro(VEK) en Kantono, Ĉinio

Sume 30 personoj partoprenis la kurson, Dennis KEEFE gvidis la kursaron. Venis al la kursaro vjetanama knabino.

2). 2011.8.12-15, la 1a ILEI-seminario en Orienta Azio en Tianjin, Ĉinio

La 1a ILEI-seminario en Orienta Azio okazas en Tianjin, Ĉinio, inter la 12a kaj 15a de aŭgusto. Pli ol 70 personoj el Ĉinio, Japanio, Koreio, Mongolio kaj Brazilo ĉeestis la seminarion. Dume spertaj instruistoj faris prelegojn pri E-instruado kaj demonstrajn instruojn. Ĉina, japana kaj korea ILEI-sekcioj kunsidis por diskuti pri kunlaboro de E-movado inter orientaj landoj. Mongola esperantistino ĉeestis la kunsidon kiel observanto. Oni diskutis ankaŭ pri la jarkonferenco de ILEI okazonta en Kunming, Ĉinio, 2012.

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

2011.12.23-25, Hefei, Ĉinio, la 9a Ĉina Tutlanda Kongreso de Esperanto_

Propraj projektoj dum 2011:

VEK (vintra E-kursaro en suda parto),
SEK (somera E-kursaro en norda parto)

Konata E-instruado en via teritorio:

1. Baiyangshujie-Xiaoxue elementa lernejo

Loko: Baiyangshujie, Taiyuan, Shanxi, Ĉinujo
Nomo de lernejo: Baiyangshujie-elementa lernejo
Lernejtipo: Unuagrada/baza
Kontaktadreso: Baiyangshujie- Xiaoxue ,Taiyuan, Shanxi, CN-030003
Kursogvidanto: WEI Yubin
kvalifiko: diplomita lingvoinstruisto
ligvonivelo: komencantoj
Oftece: 2 horoj/semajno
Kvanto de kursanoj: 100
Aĝoj: 7-9j
Uzataj lerniloj: Aŭtoro: LI Weilun
Titolo: Moderna Esperanto por infano
Kursokomenco: 2008-03-04
Kursofino: 2012-06-30

2. Tianjiabing Supera Mezlernejo

Loko: Baotou, Interna Mongolio, Ĉinujo
Nomo de lernejo: Tianjiabing Supera Mezlernejo
Lernejtipo: Baza
Kontaktadreso: 37#, Sanbalu, Baotou, Interna Mongolio
Kursogvidanto: LIU Baoguo
kvalifiko: Diplomita lingvoinstruisto
ligvonivelo: Komencantoj
Oftece: 2 horoj/semajno
Kvanto de kursanoj: 500
Aĝoj: 14-18j
Uzataj lerniloj: Aŭtoro: Li Shijun:
Titolo: Esperanta lernolibro
Kursokomenco: 2011-09-01
Kursofino: 2012-07-10

3. Dongfang Elementa Lernejo

Loko: Changzhou, Jiangsu, Ĉinujo
Nomo de lernejo: Dongfang Elementa Lernejo
Lernejtipo: Baza
Kontaktadreso: 542Lanling Lu, Changzhou, Jiangsu
Kursogvidanto: CHEN Ye
kvalifiko: Diplomita lingvoinstruisto
ligvonivelo: Komencantoj
Oftece: 2 horoj/semajno
Kvanto de kursanoj: 150
Aĝoj: 6-12j

Uzataj lerniloj: Aŭtoro: Li Weilun
Titolo: Esperanto por infanoj
Kursokomenco: 2011-09-05
Kursofino: 2012-07-15

Aliaj atingoj en 2011

Niaj membroj daŭre gvidis E-kursojn en altlernejoj, mezlernejoj kaj element-lernejoj. Ili faris prelegojn dum diversaj aranĝoj.

Danio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Dana ILEI Sekcio

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011: sume 16

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso: ne

Retgrupo: ne

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrototizo:

Nuna estraro de la sekcio: sekciestro Bent Jensenius, Hojstrupvej 124, DK-2700 Bronshøj, bentjensenius@gmail.com

=== Agado ===

Jarraporto 2011

La granda defio de nia sekcio en 2011 estis aranĝi la 44-an Konferencon de ILEI kiu okazis la 17an-23an de julio. La konferenco tre bone sukcesis kun la ĝisnuna plej granda nombro de konferencanoj, nome 103 partoprenantoj el 35 landoj. Fine de la konferenco, la 23an-24an de julio okazis simpozio pri lingvoj de scienca komunikado kaj edukado. La konferenco kaj la simpozio okazis en la Humanistika Fakultato de la Universitato de Kopenhago kun la temo "Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado". La estraro de la dana sekcio kune kun kelkaj pluraj membroj fondis la LKK de la konferenco jam en 2010, kiam ILEI komunikis al nia sekcio la informon ke la konferenco okazos en Kopenhago. Ni opinias ke la okazigo de la konferenco semajno antaŭ la 96a UK en Kopenhago certe grave influis al la grandnombra partopreno de la aliĝintoj kiuj tiamaniere povis ĝui ambaŭ eventojn.

Antaŭ la konferenco, en junio, grupo de 7 profesoroj de la Ĉina Komunikada Universitato vizitis la Universitaton de Kopenhago por kunlaboriga kontakto inter la du universitatoj, dank al YU Jinĉao, instruistino de la Ĉina Universitato, kiu informis ilin pri la ILEI konferenco

Aliaj aktivecoj de la sekcio

Dum 2011 la sekcio aranĝis kurson por komencantoj kun partopreno de 5 personoj kaj kurson por daŭrigantoj kun partopreno de 10 personoj.

Okazis la dua eldono de la vortaro Dana-Esperanto kies unua eldono rapide elĉerpiĝis en 2010. Same la lernolibro de Stano Marcek – rekta metodo, tre rapide elĉerpiĝis kaj nia Libroservo aĉetis novan stokon de la dua eldono.

Ni daŭre instigas niajn membrojn partopreni en internaciaj kursoj kaj ekzamenoj, kaj unu dana membro partoprenis la kurson kiu okazis dum unu monato en Ĉinio ĉi-vintre.

La ILEI-sekcio kune kun la landa asocio partoprenas en la projekto 125 kaj daŭrigas sian agadon ankaŭ en 2012 kun kursoj por komencantoj kaj daŭrigantoj.

Finnlando



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj ELFI

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011: Sume: 18. Detale: paperaj 8, retaj 10, aliaj (HM,DM) 0

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 2

Oficiala hejmpaĝo: http://www.esperanto.fi/elfi_f.htm

Tapani AARNE prizorgas ĝin kaj ĝisdatigas tuj, kiam aperos io nova.

Oficiala ret-adreso: sylvia.h@kolumbus.fi , la adreso de la prezidanto

Retgrupo: ne

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrotizo: 26 € kaj 13 €

Nuna estraro de la sekcio: prezidanto Sylvia Hämäläinen sylvia.h@kolumbus.fi, F.E. Sillanpään katu 2 C 46 33230 TAMPERE; vicprezidanto Raita Pyhälä, sekretario Tapani Aarne, estrarano Tiina Oittinen, estrarano Harri Laine, vicestrarano Carola Antskog, vicestrarano Tuomo Grundström

=== Agado ===

Propraj projektoj dum 2011:

Kompilo de la historio de la ligo aperos en 2012 (*okazis, ILEI posedas ĝin*).


Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

En lernu! kunlaboras du membroj ĉe vortaro, kursoj kaj tradukado

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

Artikolo en gazeto pri lokano en UK. Eta ekspozicio en biblioteko.

Francio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Franca sekcio de ILEI – GEE

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011:

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo:

Oficiala ret-adreso:

Retgrupo:

Revuo sekcia:

Enlanda membrotizo:

Nuna estraro de la sekcio: Prezidanto DECHY Michel, 65 allée de la crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq, michel_dechy@hotmail.com, vicprezidanto CATIL Jo, sekretariino HOUVIEZ Maryvonne, vic-sekretario RISTE Gaston, kasistino ARNAUD Monique

=== Agado ===

Laŭ la loko niaj gekolegoj agis plej bone kiel eble...

En Chateauroux :

Dum la jaro 2011 okazis diversaj kursoj por infanoj kaj plenkreskuloj ĉu en « Maison des Droits de l'Enfant », ĉu en « Maison de Quartier Est » en la urbo Chateauroux(36) kaj Collège Romain Rolland en la urbo Déols (36130).

Kunlabore kun aliaj asocioj cele al la ne-perforto estis falditaj grupoj (2800) poste sendita al la Paca Muzeo de Hiroŝimo kunhelpo de Osioka Taeko .

Eta ekspozicio prezentita diversloke en publikaj lokoj kie estis salono pri libroj.

La mezlernejo Romain Rolland sekvis Alice kaj Cedric dum ilia vojaĝo kuŝbicikle dum 2 jaroj kaj duono. Post ilia vojaĝo, printempe 2011, ili prelegis kaj insterŝanĝis spertojn kun la gelernantoj.

La infanoj de la MDE kaj de la mezlernejo, krom la kursoj, partoprenis en internacia desegnaĵa konkurso organizita de la esperantista asocio de Saint-Nazaire.

Per du atelieroj, dumil junuloj 13 ĝis 30 jaraĝaj dum « Le festival des boussoles » en Argenton sur Creuse povis malkovri la internacian lingvon.

En Banjero de Bigoro (Alt-Pireneoj) ĉiun lundon vespere okazas:

- Praktikad-ateliero kun dek homoj (celo: praktiki Esperanton per konkretaj reakigoj) kun paralela komenca kurso.

EI ESPERANTO FRANCE-EST, E.Ludwig

Ĝis junio 2011 funkciis kontentige Esperanto-kurso kun ok gestudentoj en la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj en la universitato de HAUTE-ALSACE (Mulhouse)

Estis projekto daŭrigi per dua grado kaj nova unuagrada kurso. Sed bedaŭrinde la financaj instancoj de la universitato postulis minimuman nombron de 15 gestudentoj por funkciigi kurson.- Malgraŭ la senrezerva subteno de la dekano, Sinjoro Yann Kerdiles, la Esperanto-kurso, same kiel la kursoj pri aliaj lingvoj ne povis eki.

Tamen la gekolegoj promesis daŭre inviti Esperanton al la Tago de la lingvoj en la universitato.

En Le Mans J HUBERDEAU

Laŭ pli/malpli da intereso nuntempe por esperanto-lernado, okazis kunveno por eksaj lernantoj cele al praktikado de la lingvo per traduko de tekstoj kaj tiel homoj restas en la asocio.

En Parizo, Michèle Abada Simon organizis 2 staĝojn semajnfine, printempe kaj aŭtune. Ŝi gvidas kurson semajne. Komence de la jaro estis 3 personoj - 2-a grada nivelo kaj nun okazas « stranga ideo » : tie partoprenas inter 5 kaj 12 homoj. En septembro venis 2 homoj por la 1-a grada nivelo.

En Marseille kaj en **La Ciotat** : TRIOLLE Renée

Kursoj okazis en Marseille ĉe CIRA kun unu komencanto kaj kvar lernantoj priparolas surbaze de tekstoj el *Monato*, *Esperanto*, aŭ eltiraĵoj de aliaj literaturaĵoj beletraj aŭ ne. Diversaj kursoj el diversaj niveloj okazas en La Ciotat. Tiuj kursoj preparas al la kapableco pri turismo aŭ aliteme per konversacia kurso por ion kunfesti sed ĉiam en Esperanto.

En Lille :

Kursoj en Universitato Lille III (Univ. pri literaturo) : Neoficialaj kursoj, jaraj, durnivelaj (komencantoj kaj progresantoj) ; instruas Claude Longue Epée kaj Michel Dechy.

Kursoj por komencantoj en iu « Kvartala Domo » de Lille, jaraj, Katja Boen.

Kursoj en U.T.L. (Univ. pri Libera Tempo) ; Michel Dechy.

Partopreno dum « Kulturaj Semajnoj » en 2 Kolegioj de V. d'Ascq kaj Hellesmes; Michel Dechy, Jean Michel Dechaume, Katja Boen.

Prezento de Eo en liceo Gondécourt : 2 klasoj ; Michel Dechy.

3 seancoj en 2 elementaj lernejoj : Eo, matematikoj en Eo, sorobano en Eo) ; Michel Dechy ; agadoj prezentitaj en Grezijono okaze de staĝo en julio laŭ la temo : « kiel eniri la instruantajn mediojn ? »

Prelegoj en Rotary, Lions, diversaj asocioj ... Michel Dechy.

Partopreno en Festivalo pri Lingvoj de Lille (aprilo), en la grandega stratbazaro de Lille (septembro), Festivalo pri bildstrioj (novembro), urba kaj regiona festo de Asocioj en Lille (junio), foiro pri Asocioj (septembro) ; Xavier Dewidehem, Vincent Peigniez, Julia Hedoux, Michel Dechy.

Regiona Ekzamen-Sesio de FEI en Lille, ĉiujunie ; Claude Longue Epée.

Kiel en multaj lokoj, la gekolegoj petis la subskribon por la peticio : « L'ESPERANTO en OPTION au BACCALAUREAT ».

Raportis Jo Catil kaj M.Arnaud .

Germanio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI)

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Verband Deutscher Esperanto-Lehrer e.V (VDEL)

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1968/2006.07.04 (nova statuto, nova registriĝo)

Jura statuso: Asocio jure registrita ĉe juĝejo en Hannover, Amtsgericht, Registergericht, 04.07.2006

Rilato kun Landa Asocio de UEA: sendependa organizaĵo, faka asocio de GEA

Membro-nombro fine de 2011: Sume: 84. Detale: paperaj 78, retaj 6, aliaj (HM,DM) 0; 6 familianoj kun sama adreso, kiuj ne pagas plenan membrotizon kaj ne ricevas IPR de ILEI, do la landa listo enhavas 90 membrojn.

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo: <http://esperanto.de/agei>, prizorgas Zsófia Kóródy

Oficiala ret-adreso: zsofia.korody@esperanto.de

Retgrupo: instru-german@yahoo.com, prezidanto de AGEI, Zsófia Korody plusendas mesaĝojn al la listo.

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrotizo: 25 EUR, pro la altigita ILEI-kotizo ekde 2012 restas 5 EUR/membro por landa agado

Nuna estraro de la sekcio: Prezidanto Zsófia Korody, zsofia.korody@esperanto.de

=== Agado ===

AGEI estas komunitila asocio, agadas por interkompreniĝo de popoloj, eduko al paco kaj toleremo. La asocio helpas la lernejan kaj universitatan instruadon de Esperanto, proponas internaciajn amikajn kontaktojn inter lernantoj de Esperanto, instigas al internacia interŝanĝo de lernantoj, zorgas pri trejnado de Esperanto-instruistoj, ellaboras kaj disvastigas esperantajn instru- kaj ekzamenmaterialojn, rekomendas lingvajn ekzamenojn ankaŭ laŭ internaciaj normoj, kunlaboras kun similaj internaciaj fakorganizaĵoj, estas alparolpartnero por la ministerio pri edukado rilate al Esperanto-instruado.

AGEI organizas fakajn kunvenojn, instigas al verkado de fakaj artikoloj kaj fakliteraturo, donas fakajn servojn al siaj membroj.

Gravas ankaŭ la konsultado pri instruagado, metodika-didaktika helpo por gekolegoj, spertinterŝanĝo pri lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado.

Propraj aranĝoj dum 2011:

Torpedo-7, Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia: pedagogiaj tagoj por klerigado, faka pluklerigado, spertinterŝanĝo inter gekolegoj.

En 2011 TORPEDO-7 estis samtempe seminario pri kunlaboro inter edukcentroj kaj bibliotekoj. Tiu temo vekis grandan intereson kaj donis eblon al la gekolegoj por spertinterŝanĝo kaj planado de kunlaboro por fortigi landajn kaj internaciajn agadojn, instruprojektojn por Esperanto.

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

Dum la Germana Esperanto-Kongreso en Münster AGEI havis sian jarĉefkunvenon, kiun ĉeestis ankaŭ Stefan MacGill, prezidanto de ILEI. Temis ankaŭ pri preparlaboroj por festi la jubilean jaron, la 125an datrevenon de Esperanto. Krom tio multaj membroj partoprenis

en la prelego de Zsófia Kóródy, AGEI-prezidanto kaj Peter Zilvar de Interkultura Centro Herzberg. En formo de prelegoj kaj laborgrupo estis prezentitaj sukcesaj EU-projektoj: Kiel plani, prezenti kaj efektivigi projektojn? Kiel akiri subvenciojn por lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado? Prezento, fotoj, filmoj pri realigitaj Comenius kaj Grundtvig-projektoj. Sukcesa internacia kunlaborado de lernejoj, instruistoj kaj plenkreskuloj, kontaktoj kun alilanda amikaro, rezultodona trejnado, instrukapablado, engaĝo de la generacio 55+. Personaj spertoj, travivaĵoj, interŝanĝo de ideoj, diskutado pri projektpronoj, planoj.

Propraj projektoj dum 2011:

Preparlaboro por organizi en 2012 agnoskitan klerigsemajnon, lingvolernadon (Bildungsurlaubswochen) kadre de popola altlernejo (KVHS) en Osterode. Ellaboro de alvokteksto kaj detala priskribo de la enhavo.

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

Ellaboro de Comenius-projekto kun partneroj el Portugalio, Italio, Pollando kaj Rumanio. Bedaŭrinde ne ricevis aprobon, sed la kontaktoj kun tiuj lernejoj daŭras. Kunsidon ni havis dum UK en Kopenhago, portugala lerneja grupo venos al PSI, la pola partnero kun malgranda grupo vizitos Herzberg en junio 2012.

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

Ekz. AGEI starigis informbudon dum la fama, granda, instru-rilata ekspozicio DIDACTA 2011 en Stuttgart. Dank' al deĵorantaj gekolegoj la atento estis vekita por Esperanto kaj pluraj adresoj de interesiĝantoj pri Esperanto estis kolektitaj. AGEI dankas al Fondaĵo Mondo kaj GEA pro la subteno de tiu varbado.

Bona varbado estas la anoncoj pri Esperanto-kursoj en la programkajeroj de Popolaltlernejoj (VHS). Tiuj atingas dek-, eĉ centmilojn da legantoj, familiojn, vastan publikon. Eĉ se poste ne realiĝos kurso pro manko de sufiĉaj partoprenantoj, la legantoj povas vidi, ke Esperanto vivas.

Sur la hejmpaĝo de AGEI <http://esperanto.de/agei> estas pluraj modeloj de alvokoj, kiuj povos utili al novaj iniciatoj.

Esperantlingva varbado por membriĝo okazadas dum la klerigesioj en Herzberg, dum grandaj Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj enlandaj.

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

AGEI kunlaboras kun Interkultura Centro Herzberg kaj la popolaltlernejo (VHS) de Osterode ekz. por organizado de feriotempa studsemajno.

En 2011 la unuan fojon sukcesis organizi intensan, 40 horan tutsemajnan kurson, kiu estas agnoskita de la Edukministerio kaj la partoprenantoj povas ricevi pagitan feriotempon de siaj laborlokoj. La lernado okazis en du grupoj: por komencantoj kaj bonparolantoj.

Ankaŭ en aliaj urboj okazadis alvokoj per regionaj popolaltlernejoj, kiuj anoncas lingvokursojn, inter ili ankaŭ Esperantan.

Konata E-instruado en via teritorio:

Vidu liston de lernejoj (bazaj kaj mezgradaj) kaj universitatoj ĉe edukado.net. Menciindas la regula Esperanto-instruado en elementa lernejo, en la gimnazio kaj en la meza lernejo en Herzberg am Harz.

Granda sukceso en universitatnivela edukado estas la lernogrupoj en Universitato Emden, kie en la aŭtuna semestro de 2011 ĉ. 100 studentoj konatiĝis kun Esperanto kaj pluraj el ili elektis ankaŭ la sekvasemestran daŭrigan fazon.

Ankaŭ en Münster regule okazas Esperanto-kursoj.

Aliaj atingoj en 2011

Interkultura Centro Herzberg organizis studvojaĝon al Herzberg por 10-membra lerneja klaso el Suda Koreio. Ili vizitis multajn lecionojn en la meza lernejo, prezentis sian muzik-kaj dancprogramon en la lernejo, en kluboj kaj eĉ sur la ĉefplaco en la urbo.

Fortiĝis Esperanto-instruado en gimnazio en Erfurt. Ili pretigis tradukon de faldfolio pri la lernejo kaj akceptis la korean junulgrupon, al kiu ili montris sian lernejon kaj organizis por ili urborigardadon (vidu la kovrilon de *Juna amiko*, 2012/1).

Hungario



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Asocio de hungariaj esperantistaj pedagogoj

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Eszperantista Pedagógusok Magyarországi Egyesülete (EPME)

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: fakta fondo: 1990. dec. 13.

Jura statuso: ŝtate agnoskita, Budapest, Pk. 64957/1991/1, 1991.02.13 sub numero 3346

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011: Sume: 54, detale: paperaj 37, retaj 16, aliaj (HM) 1. ni havis 3 pliajn membrojn, kiuj ne apartenis al ILEI, do, sume ni havis 57 membrojn.

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2011: momente: 4

Oficiala hejmpaĝo: <http://www.ilei.info/hungario/>. Ĝin prizorgas la sekciestro, J. Németh.

Oficiala ret-adreso: tiu de la sekciestro (jozefo.nemeth@gmail.com)

Retgrupo: jes ("Eszperantó oktatók, tanárok listája" ilei-hu@lev-lista.hu)

Internacia ILEI rajtas sendi mesaghojn al la retgrupo, pere de ĝia prezidanto, kiu membras en la listo.

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrotizo: 500 HUF

Nuna estraro de la sekcio:

Németh József, prezidanto, Ihász Fő u. 41/5. 8531 89/356 050,70/9310530 ,
jozefonemeth@yahoo.com ; Kovács Márta, Budapest Ady E. 23-25/C. II.2. 1221
1/2263602 bdg.kovacs.marta@gmail.com ; Salomonné Csiszár Pálma, Budapest
Bakáts u. 1-3. III/1 1093 1/2173912 cspalma@freemail.hu ; Sereghyné Zengő
Enikő, Balsa Rákóczi u. 82. 4468 (42) 316 122 enemy@freemail.hu ;
Kováts Katalin, RP Den Haag, Sparwaterstraat 74. NL-2593 Nederlando,
katalin.kovats@gmail.com.

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: En la jaro 2014 elektiĝos nova estraro.

=== **Agado** ===

Pedagogia Tago de la hungara ILEI-sekcio

Tute plena ĉambro da kolegoj kuniĝis en Budapeŝto el ĉiuj partoj de la lando **en la 2a de aprilo, 2011** – ĉ. 45 partoprenintoj el kiuj 29 membroj de la hungara sekcio, sekve okazis kadre de la tago kvoruma jarkunsido. Valora kaj intensa faka programo disvolviĝis - kies plimulto rilatis al la unika ekzamena situacio en Hungario – tio altiris multajn kursgvidantojn, ĉar iliaj ŝancoj liveri sukcesintojn dependas forte je bona informiteco pri la postuloj kaj proceduroj. La programo inkluzivis tute praktikajn ekzercojn kiuj engaĝis ĉiujn partoprenantojn.

Partoprenis kaj salutis la kunvenon la prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo (KEL), s-ino Judita Rey-Hudeček, cele al proksimigo de rilatoj kun Hungaria Esperanto-Asocio (HEA) kaj

la hungara ILEI-sekcio (EPME) pri fortigo de la enlanda instruado en Kroatio kaj intensigo de translimaj kontaktoj inter la najbaraj landoj, kiuj tradicie estis bonaj kaj meritas refortigon.

En unu programero, la nove aperinta libro "Temagemo" de Judit Felszeghy estis prezentita de la prezidanto de ILEI. La lernolibro ja utilas por aktivigi la parolkapablon de ekzamenkandidatoj, sed havas kroman avantaĝon, ke ĝi estas pure Esperantlingva verko. Recenzo aperis en "Internacia Pedagogia Revuo" (IPR). La prezenton faris la internacia ILEI, ĉar nia ligo dum pluraj jaroj maturigis la verkon por aperigo, sed fine alia eldonejo transprenis la taskon. Similo okazis pri la lernpakaĵo de Josias Barboza el Brazilo (vidu recenzon en IPR 2011/1), kiu ricevis koncizan sed laŭdan prezenton, kiel same "Detala Gramatiko de Esperanto" de Bertil Wennergren (eldonita de ILEI kaj E@I) kaj la "Manlibro pri la Instruado de Esperanto".

Kelkajn minutojn fine de la prezentaĵo ni dediĉis al lastaj novaĵoj de la internacia ILEI, kun iom da demandoj, precipe pri la ebloj de la unujaraj instruisto-trejnaj kursoj en Poznano (Pollando) liveri atestilon, kiun hungara lernejo akceptus.

Dum la jarkunsido de EPME okazis elekto de nova estraro por la sekva tri-jara periodo. ILEI aparte laŭdis la fakton ke akceptis proponiĝon ok kandidatoj por la kvin lokoj – proponemo malofte spertata en niaj rondoj. Jen la elektitaj estraranoj en alfabeto vicordo:

Kovács Márta
Kovács Katalin
Németh József
Salomonné Csiszár Pálma
Sereghyné Zengő Enikő

ILEI gratulis la elektitojn, kaj instigis al la neelektitoj tamen ludadi aktivan rolon ene de la sekcio, aŭ eĉ je internacia skalo.

Jen la programo de la tago:

- 10.00-11.00 Laboratoriaj taskoj -- aŭdkapablo en la praktiko (difino de la niveloj, diskonigo de statistiko, aŭskultado de teksto, solvo de taskoj). Preleginto: S-ro Dániel Lariko Golden
- 11.00-12.00 Preparo de taskoj por la ekzamenero 'kompreno de la parolata lingvo'. Preleginto: S-ino Márta Kovács
- 12.00-13.00: EPME jarkunsido (kun estrar-elekto – kaj sandviĉoj)
- 13.00-13.45 Prezentado de lernolibro por progresantoj de Judit Felszeghy TEMAGEMO – Preleginto: Stefan MacGill. La aŭtoro respondis al demandoj.
- 13.45-14.30 „Sen instruado Esperanto ne ekzistus” (raporto pri la univertataj kursoj en Poznano). Preleginto: Szabolcs Szilva
- 14.30-15.15 Gramatika pliperfektigo (refleksivaj pronomoj). Preleginto: Blazio Vaha

Jozefo Nemeth, sekciestro, 25a de marto 2012

Italio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Itala sekcio se ILEI

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Sezione italiana dell'Associazione Internazionale degli Insegnanti di Esperanto

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1990/1990

Jura statuso: ne

Rilato kun Landa Asocio de UEA: kunlabora

Membro-nombro fine de 2011: Sume: 65 Detale: paperaj 59, retaj 6, aliaj (HM,DM) 0.

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 4

Ermanno Tarracchini ermanno.tarracchini@tiscali.it

Anna Maria Colacicchi colacan@alice.it

Filomena Canzano filomena.canzano@infinito.it

Leonardo Pampaloni pampa.leo@gmail.com

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso: silkovojo@aliceposta.it, retadreso de la sekciestro Luigia Oberrauch

Retgrupo: ne

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrotizo: 18 eŭrojn dum la jaro 2011 kaj 20 eŭrojn dum 2012.

Nuna estraro de la sekcio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, silkovojo@aliceposta.it, - sekciestro

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: Ekde la jaro 2001 mi estas la sekciestro kaj mi daŭre estas serĉanta homon kiu pretas anstataŭigi min.

=== **Agado** ===

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

Partopreno en Komenius-projektoj kune kun la ŝtata mezlernejo "C.Cavour" de Modena, Italio.

Propraj projektoj dum 2011:

Partopreno en FRINGOJ kune kun la gelernantoj de la ŝtata mezlernejo "C.Cavour" de Modena, aprile 2010 en Greziliono, Francio

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

Esperanto 125

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:


La itala ILEI-sekcio donis kontribuon de 250 eŭrojn al la studento Pierre Caliaro, kiu estas studanta ĉe la fakulo pri Interlingvistiko kaj Esperantologio de la Universitato Adam Mickiewicz de Poznano (Pollando).

Aliaj atingoj en 2011

Kunlaboro kun la Itala Instituto de Esperanto kiu kontrolas la ekzamenojn de la unua, dua kaj tria grado en nia lando. Ene de tiu ĉi kunlaborado estis organizita didaktika seminario en Sestri Levante (Genovo) dum semajnfino en aprilo 2011.

Kompilis Luigia Oberrauch

Japanio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Japana Sekcio de ILEI/ILEI-JP

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1986/2010 (reorganizita)

Jura statuso: ne

Rilato kun Landa Asocio de UEA: kunlabora

Membro-nombro fine de 2011: Sume: 28, detale: paperaj 13, retaj 14, aliaj (DM) 1, (enlandaj membroj) 5.

Nombro da rajtigitaĵoj / nomumitaĵoj komitatanoj por 2012: 2

Oficiala hejmpaĝo: <https://sites.google.com/site/ileijpesperanto>

Retgrupo: Jes. Ni tamen ne pretas permesi al la internacia ILEI dissendi rekte mesaĝon al niaj membroj. Dependas pri kio temas, sed kelkaj ne ŝatas ricevi mesaĝojn, kiuj laŭ ili estas malatentindaj. Gravaj mesaĝoj estos plusenditaj per nia retgrupo.

Revuo sekcia: retan bultenon "LUCERNO" kelkfoje jare, neregule, redaktas s-ro Matuki Yoshinobu, myoshi@abelia.ocn.ne.jp

Enlanda membrotizo: 500 JPY

Nuna estraro de la sekcio: estro ISIKAWA Tieko(s-ino) isksanjo@ff.e-mansion.com, Tate 1-6-6-103, Siki-si, Saitama-ken 353-0006; Vicedstro TAJIMA Mayuko(s-ino) taji-mayu@hotmail.co.jp; Sekretario KINUGASA Hirosi(s-ro) kinuhiros@yahoo.co.jp, Sinkawasaki 6-1-226, Saiwaki-ku, Kasasaki-si, Kanagawa-ken 212-0032; Kasisto ISINO Masayo(s-ino) isino.masayo@nifty.com, Isihara 3-9-5, Sumida-ku, Tokio 130-0011; Redaktoro MATUKI Yoshinobu(s-ro) myoshi@abelia.ocn.ne.jp, Saiwaityo 2-44-4, Futyu-si 183-0054

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: 2 jaroj, la sekva elekto okazos en septembro, 2013

=== **Agado** ===

Propraj aranĝoj dum 2011:

Fakkunsido de ILEI en la Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en Seongnam, Koreio (07-09 oktobro) —el ILEI-JP ĉeestis 12 personoj. ILEI-anoj el ambaŭ landoj interkonatiĝis kaj diskutis pri diversaj temoj, precipe pri instruado de Esperanto en lernejoj.

Propraj projektoj dum 2011:

Japanigo de "Malkovru Esperanton"—traduklaboro jam finiĝis kaj sekvos laboro por konformigi al la paĝaro.

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

La 1-a Komuna ILEI-Seminario de Ĉinio, Japanio kaj Koreio en Tianjin, Ĉinio (08-15 aŭgusto) — ĉeestis 2 personoj el ILEI-JP.

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

Varbado pere de "La Revuo Orienta", la organo de JEI.

Varbado dum kongresoj kaj kelkaj aranĝoj montrante nian sekciajn revuon.

Konata E-instruado en via teritorio:

- 1) Esperanto-instruado en la mezlernejo Niŝiŝiba, Jokohamo
5 lernantoj (14-15 jaraj), entute 14 lecionoj kiel fakultativa lernobjekto, gvidis la lecionojn s-ino Doi Ĉieko (ne ILEI-ano).
- 2) Esperanto-instruado en Ikeda-kita Supermezlernejo, Osaka
11 lernantoj (17-18 jaraj), en la kadro de lernoplano "Interkulturo", kiel duonjara fakultativa lernobjekto. Instruis s-ino Huzimoto Ricko uzante miksitajn manierojn. Alilandaj gastoj dufoje vizitis la klason.
- 3) Esperanto-instruado en Nippa Supermezlernejo, Jokohamo
Ĉirkaŭ 10 lernantoj (17-18 jaraj), kadre de tutjara fakultativa lernobjekto, instruis s-ro Kitagawa Hisasi (ne ILEI-ano) kun sia proprefaritaj lernomaterialoj.
- 4) Esperanto-instruado en Saitama Universitato kaj Tokia Instituto de Teknologio
Instruis en ambaŭ universitatoj prof. Sasaki Teruhiro, al malmultaj studentoj.

Aliaj atingoj en 2011

ILEI-JP konsentis, ke sekcioj en Ĉinio, Japanio kaj Koreio kune okazigos la 2an Komunan ILEI-Seminarion kadre de la 45a ILEI-Konferenco en Kunming, 2012.

Enketila plenskribinto:

ISIKAWA Tiekō, sekciestro, 2012.03.28

Kataluna Sekcio – Hispanio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Kataluna Sekcio de ILEI (ILEI-Cat)

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Secció Catalana de la Lliga Internacional de Professors Esperantistes (ILEI-Cat)

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1998/1999

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011:

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo: <http://www.xtec.net/~pmarti10/ilei-cat.htm>

Oficiala ret-adreso:

Retgrupo:

Revuo sekcia:

Enlanda membrotizo:

Nuna estraro de la sekcio: estro Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2, ES-1700 Blanes, ileicat@hotmail.com

=== Agado ===

(Ne raportis la laboron)

Korea Respubliko



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Korea sekcio de ILEI

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Hankook jibu de ILEI

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso: ne

Rilato kun Landa Asocio de UEA: Kunlabora

Membro-nombro fine de 2011: sume 24 (paperaj 24)

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 2

Oficiala hejmpaĝo: <http://esperanto.or.kr/club/myclub/?url=ileidekoreio>

Oficiala ret-adreso: esperanto@saluton.net

Retgrupo: Tra retpaĝo

Revuo sekcia:

Enlanda membrokotizo:

Nuna estraro de la sekcio:

Sekciestro : S-ro LEE Jungkee (Esperanto@saluton.net), Vicestro : S-ro PARK, Yongsung (esabpark@korea.com), Sekr. : S-ino BEK Sun-jo (baj1031@hanmail.net)

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: Ne fiksita

=== Agado ===

Propraj aranĝoj dum 2010:

Seminario de Korea sekcio de ILEI

Propraj projektoj dum 2011:

Renkontiĝo kun koreaj kaj tajvanaj geknaboj en Pingtung, Tajvano (12.3~6, 2011)

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

- Partopreni en la 1-a ILEI-Seminario en Orienta Azio en Tenjin, Ĉinio (ISOA)
- Komuna faka kunsido en la komuna kongreso de koreaj kaj japanaj esperantistoj.

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

Membrigi instruistojn, kiuj estas membroj de Korea Esperanto-Asocio

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

Aparta kurso por instruistoj de Alternativa lernejo

Konata E-instruado en via teritorio:

Seula Esperanto-Kulturcentro okazadas ĉiumonatan kurson por civitanoj. (240-a kurso en dec. 2011 kaj en la 3-a de nov. okazos festo memore al la 250-a kurso)

Kroatio-KEU



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: KROATA ILEI - SEKCIO (KEU)

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011: 7 paperaj (internacia), 14 enlandaj

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso:

Retgrupo: ne

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrokotizo:

Nuna estraro de la sekcio: Sekciestro Ivan Bekavac-Basic', Kuslanova 59, HR-10000 Zagreb, ilei@hes-keu.hr

=== Agado ===

La membraro de la internacia ILEI nun estas sep (reta abono de IPR), kaj same pligrandiĝis la nombro de la enlandaj kunlaborantoj (14).

Rilatoj kun ILEI restas daŭre je la koresponda nivelo, ĉar pro financaj kialoj ankaŭ dum ĉi tiu jaro ne eblis partopreni la konferencon.

Regulaj kunvenoj, en la formo de la studrondoj (studvesperoj) okazis kvin foje (februaro, majo, julio, septembro, novembro). Dum tiuj kunvenoj oni ĉefe interŝanĝis la spertojn el la eduka medio kaj informiĝis pri novaj eldonoj rilate la E-instruadon. Oni ankaŭ informiĝis pri e-libroj kaj esperantaj periodaĵoj aperataj elektronikforme.

Oni i.a. pridiskutis kaj konkludis necesan rean aktivadon rilate la abonoj al "Juna amiko", pri kio la sekcio iam elstaris. Momente oni decidis pri etkvanta abono en espero ke la lernantoj kaj tiuj kiuj finis la bazajn kursojn ĝin povus uzi kiel bona legmaterialo.

Du tagaj seminarioj okazis en januaro kaj aŭgusto. Dum ili oni ĉefe traktis kiel pliriĉigi la studhorojn kaj laborrondojn por lernantoj. Dank' al la ekstera kunlaboranto oni pristudis kelkajn paperteĥnikojn. Ĉar la membroj tion taksis ege interesa ankaŭ el ĝenerala vidpunkto, oni faris la enketon pri estontaj similaj seminarioj kiuj rezultiĝis kun la deziro pristudi la silkdesegno-teĥnikojn. Feliĉe inter la membroj ni havas spertulinon kaj la seminario okazos dum la someraj ferioj 2012.

Dum la lernojaro la membraro engaĝiĝas en la E-kursoj por la bazlernejanoj (regula semajna) kaj korespondkurso (brazila). Krome estis organizitaj kelkaj pri lingvaj studrondoj dum kiuj oni parolis pri interkulturo kaj la rolo de Esperanto kiel pontlingvo.

Agado rilate neesperantan publikon oni fiksas al du okazaĵoj: La tago de la patrina lingvo (februaro) kaj la Eŭropa lingva tago (septembro).

Planoj por la jaro 2012:

- ttt-ejo
- pristudo de la 20-jara agado

Kompilis: ibb/mb

Kroatio-UPE



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto (UPE)

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Udruga predavača Esperanta (UPE)

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 2007/

Jura statuso: Jes, registrita, Zagreb, 2007, Urba oficejo

Rilato kun Landa Asocio de UEA: kunlabora

Membro-nombro fine de 2011: 6 (1 papera, 5 retaj)

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 1

Oficiala hejmpaĝo:

Oficiala ret-adreso: mjerkovic@ net.hr, adreso: Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio

Retgrupo: ne

Revuo sekcia:

Enlanda membrototizo: 50 kunaĵoj, duono por la landa agado

Nuna estraro de la sekcio: Marija Jerkovic, prezidanto, Emil Hrvatin, sekretario, membroj :Boris di Costanzo, Pagoda Čaldarević

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: 2015

=== Agado ===

Propraj aranĝoj dum 2010:

E-instruado en lernejoj Mladost kaj Retkovec

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

kluboj, 5 E- kursoj por plenkreskuloj

Propraj projektoj dum 2011:

Konkurso por gelernantoj pri la scio de Esperanto en Kostrena Esperanto-domo

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

Novaj sekcioj en du urboj.

Konata E-instruado en via teritorio:

Pere de la Zagreba metodo.

Aliaj atingoj en 2011

Du membroj diplomiĝis je postdiplomaj studoj en Poznano Universitato Adam Mickiewicz.

Kubo



Nomo kaj mallongigo en Esperanto:

Sekcio de ILEI de Kuba Esperanto-Asocio KEA-ILEI sekcio

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Sección de Profesores de Esperanto de la Asociación Cubana de Esperanto

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1983/1990

Jura statuso: Ne

Rilato kun Landa Asocio de UEA: sekcio de landa asocio

Membro-nombro fine de 2011: 47 enlande

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 1

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso: julian@esperanto.co.cu aŭ info@esperanto.co.cu

Retgrupo:

Revuo sekcia:

Enlanda membrototizo:

Nuna estraro de la sekcio: sekciestro sinjoro Miguel Angel González Alfonso

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: 3jara, nuna elektita dum la nacia komitatkunsido de la asocio okazinta pasintfebruare.

=== Agado ===

Dum la pasinta jaro la instruantoj loĝantaj en Havano kunsidis ĉiumonate kaj tiuj loĝantaj ekster la ĉefurbo kunsidis ĉiun duan monaton por prepari kaj organizi regulajn kursojn.

La sekcianoj gvidis kursojn en jenaj provincoj: Guantánamo, Santiago de Cuba, Contramaestre(municipo de Santiago de Cuba), Holguín, Granma, Ciego de Avila, Villa Clara, Matanzas, Mayabeque, Pinar del Río, La Habana, Isla de la Juventud.

La sekcianoj ankaŭ gvidas ekspresajn kursojn kaj la perkorespondan kurson. Dum 2011, la sekcio gvidis du ekspresajn kursojn kaj en novembro kaj en decembro.

La sekcio okazigis konkursan ekzamenon en la ĉefurbo dum junio kaj kursfinajn aranĝojn tra la lando dum julio.

Kadre de la Kuba Kampanjo Omaĝe al Ĉiuj Instruistoj kaj Instruantoj, KEA kaj la sekcio omaĝis ĉiujn instruantojn per donacoj kaj laboratestilo.

Sekcianoj prelegis pri instrutemoj dum naciaj kaj regionaj renkontiĝoj okazintaj en Guantánamo, Granma, Pinar del Rio, Cienfuegos kaj La Habana.

La sekcio sendis instrumaterialojn por instruantoj kaj ankaŭ ekzemplerojn de IPR kaj Juna Amiko al sekcianoj.

Oni ankaŭ sendis instrukciojn kaj cirkulerojn por pli bone organizi la instruagadon tra la lando.

Oni organizis cirkulantan bibliotekon en provincoj por ke la instruantoj povu legi gravajn kaj interesajn librojn, revuojn, kaj aliaj instrumaterialojn.

Teamo de instruantoj laboris pri nova lernolibro de Esperanto por hispanparolantoj.

Teamo de instruantoj preparis vortaron esperanto-hispanan kiun oni eldonos baldaŭ kaj preparis kaj eldonis aliajn librojn por la asocioj.

Oni kunsidis kun funkciuloj de la Kuba Unesko-Komisiono por instrui Esperanton en iu mezlernejo el ties reto. Oni elektis la lernejon kaj oni vizitis ĝin sed ankoraŭ oni atendas oficialan respondon por komenci la kurson.

Kvar estraranoj de KEA, kiuj ankaŭ estas instruantoj, partoprenis la 96an UK en Kopenhago, Danlando. (Maritza Gutiérrez, Alberto Fernández-Calienes, Alberto Rodríguez Pineda kaj Julián Hernández).

Sro. Julián Hernández ankaŭ reprezentis la sekcion dum la lasta ILEI-Konferenco okazinta en Kopenhago, Danlando kaj prelegis pri instrutemoj dum la Seminario de Facila Vento okazinta dum SES (Somera de Esperanto Studado) en Nitra, Slovakio.

Raportas s-ro Julian Hernamdez Angulo

Meksiko



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Esperanto-Instruistoj de Meksiko (mallonge EIM)

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Maestros de Esperanto de Mexico

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 2011 / 2011

Jura statuso: Sen jura statuso

Rilato kun Landa Asocio de UEA: kunlabora kun Meksika Esperanto-Federacio

Membro-nombro fine de 2011: Ĉirkaŭ 14 homoj estas membroj de la meksika ILEI sekcio, sed ne membroj de la internacia ILEI

Nombro da rajtigitaĵoj / nomumitaĵoj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo: www.esperanto-mexico.com .

Oficiala ret-adreso: ilei@esperanto-mexico.org (prezidanto)

Ĉu via sekcio havas retgrupon: NE

Revuo sekcia: NE

Enlanda membrokotizo: Same kiel la kotizo de MEF (50\$, 100\$ aŭ 200\$ meksikajn pesojn); + kotizoj ILEI se iu membro volas aliĝi al ILEI. Se iu volus esti membro de la ILEI-sekcio sen esti membro de MEF la minimuma kotizo estas 200\$ (ducent pesojn, meksika monunuo)

Nuna estraro de la sekcio: Carlos Hernandez Loarca (sekci-estro); ilei@esperantoo-mexico.org /cfhl.esperetaro@gmail.com; Gabriela Reyes (anstataŭantino) , gabyrez2001@yahoo.com; Manuel Garcia Jurado (anstataŭanto), valhifi@gmail.com.

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: Laŭ la statuto: 2 jaroj.

=== **Agado** ===

Propraj projektoj dum 2011:

- a) subteni la lernadon de la internacia lingvo Esperanto (speciale en lernejoj kaj universitatoj)
- b) subteni Esperanto-instruistojn kaj helpi ĉe ilia faka klerigo;
- c) subteni sciencajn esplorojn pri Esperanto en Meksiko (pedagogiaj projektoj);
- ĉ) stimuli la kunlaboron kun edukaj kaj registaraj instancoj de Meksiko;
- d) unuigi la instruistaron por atingi la definitajn celojn. Krome EIM havas la celojn kaj agadkampojn de ILEI. Ĝi intencas kunlabori plejble bone kun ILEI.

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

Partopreno dum la Meksika Esperanto-Kongreso (MEK) en Guadalajara, 2011. Vizito en Nacia Foiro de Fremdaj Komunumoj. Varba parolado en Aŭtonoma Universitato de Queretaro

Konata E-instruado en via teritorio:

Ĉiusemestra duonoficiala kurso en la Aŭtonoma Universitato de Queretaro (keretaro).– 12 gelernantoj, 17 - 22 aĝaj, edukado.net, tridek horoj, neintensiva, baza kurso.

Nederlando



Nomo kaj mallongigo en Esperanto:

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011: 16

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso: ne

Retgrupo: ne

Revuo sekcia: "NGGE Sciigas", trifoje

Enlanda membrotito:

Nuna estraro de la sekcio: sekciestro Robert Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, oovo14qh@kpnmail.nl

=== Agado ===

Mallonge pri nia agado: NGGE jarkomence havis 22 membrojn, sed dume perdis Jacques Tuinder, konatan pro sia "Evidente" por vidhandikapitoj. Jarfine restas 16 membroj, interalie 2 honoraj.

Regule okazis la jarkunveno kaj studotago; trifoje aperis "NGGE SCIIGAS" dank' al la redaktado de Simon Smits. Vane ni alvokis por sekretario; ankaŭ Julija Batrakova ne trovis anstataŭanton.

La ILEI-konferencon partoprenis 5 membroj, el kiuj Julija Batrakova deĵoris kiel ILEI-kasisto, Simon Smits (komence Rob Moerbeek) partoprenis la Komitatkunsidojn, sed li ankaŭ deĵoris en la UK-budo por ILEI. Cetere Rudi Koot kaj la (kur)aĝa Nel Overwater.

En niaj organo kaj kunvenoj en Nederlando ni interalie traktis novajn instruilojn, gramatikaĵojn kaj leksikaĵojn (esperantonimojn). La reta "Alternsemajna ripeto" (tradukfrazoj) malritmiĝis, atingante nur 11-an numeron.

Kontribuoj al "Fen-x" (la organo de 'Esperanto Nederland'), "IPR" kaj programeroj en la komuna kongreso de Esperanto Nederland kaj Germana E-Asocio, kaj la ILEI-konferenco rilatis i.a. 'Erarologion'.

Ni planas partopreni la planatan retkurson Esperanto 125 (ĉ. dek esperantistoj pretas helpi komencantojn pri prononcado), liveri estraranon pri instruado al Esperanto Nederland; prepari lecionon pri UN/Unesko kunlabore en la ILEI-komisiono; kunlabori en la Statutŝanĝo de ILEI.

Instruadon ni rimarkis ĉi-lande (ne nur NGGE-kadre!)

Oficiale en la Universitato de Amsterdamo (prof. Wim Jansen: jarneze sukcesis 17 studentoj pri la lingvo Esperanto);

komenca kurso, al 10 komencantoj 8-ĝis-50-jaraj, gvidata de Rudi Koot;

preparo de belaspekta informlibro por lernantoj mezgradaj, verkantaj studaĵon/prelegon pri Esperanto. Ĝin kompilis la prezidanto de Nosobe (blinduloj), Jan Bemelmans.

La plej nombraj kursanoj restas nevideblaj: en interaga retkurso de Wil van Ganswijk kaj paralele tiu de Koos Scharroo;

Kursoj en studosemajnfinoj, organizitaj dufoje jare de Esperanto Nederland: (laŭ nia enketilo):

Marijke Lathouwers (ĉeforganizanto) al 3 komencantoj, per i.a. Mazi kaj Mil unuaj vortoj; al 3 komencantoj (8-ĝis-65-jaraj, por kiuj Arjen-Sjoerd de Vries mem preparis materialon; meznivele instruis ankaŭ Bert de Wit kaj Roel Haveman;

Rob Moerbeek al 6 progresintoj pri gramatitikaĵoj, vortprovizo (en frazoj, proverboj) kaj pri dana kaj vjetnama literaturo; nur gramatikaĵoj en semajnfino de Nosobe (vidhandikapitoj); krome al du apartaj progresintoj alternsemajne hejme (Paŝoj al plena posedo; Por la praktikantoj)

Almenaŭ jarkomence lecionis minimume tri aliaj: Johan van der Hoek (konversacia rondo); Johan Heijstra, kiu malsaniĝis; Jan Bemelmans en Nimego.

Esperigas ke almenaŭ kelkaj (do minimume 12) aktivas kaj multaj pretas, kvankam ne sukcesis al Rudi Koot varbi por nova oficiala kurso.

Rob Moerbeek raportas

Norvegio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto:

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011:

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo:

Oficiala ret-adreso:

Retgrupo:

Revuo sekcia:

Enlanda membrotizo:

Nuna estraro de la sekcio: sekciestro Anne-Karin Bondhus, Morenefarete 8A, NO-4340 Bryne, akbondhus@jkn.no

=== Agado ===

(Ne raportis la laboron)

Pollando



Nomo kaj mallongigo en Esperanto:

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI-Pollando (ILEI-PL)

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Międzynarodowy Związek Nauczycieli Esperantystów ILEI-Polska (ILEI-PL)

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso: La 31-an de julio 2007, registro ĉe la Regiona Tribunalo de la Urbo Krakovo

Rilato kun Landa Asocio de UEA: sendependa

Membro-nombro fine de 2011:

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo: www.ilei.pl (zorgas Małgosia Komarnicka)

Oficiala ret-adreso:

Retgrupo:

Revuo sekcia: IKONO – Interesaj Kompilitaj Novaĵoj

Enlanda membrotizo: 54 zł / 25 zł

Nuna estraro de la sekcio:

Nova estraro ekde septembro 2011

Tomasz Chmielik – prezidanto tchmj@wp.pl

Magdalena Tatara – kasisto mtatara@gmail.com

Robert Kamiński – sekretario rk-lodz@poczta.wp.pl

Gizela Sklorz – membro sklorzgizela@o2.pl

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj:

4 jaroj : 2011-2015, sekvaj elektoj septembro 2015

=== Agado ===

Aktiva partopreno al la 44-a ILEI – konferenco en Kopenhago. Varbado al ILEI per novaj flugfolioj preparitaj de la Pola Sekcio de ILEI dum ARKONES 2011 en Poznań kaj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj 2011 kaj per retmesaĝoj al polaj esperantistoj. Ni informis pri nia agado en la revuo „Pola Esperantisto”

Konata E-instruado en la teritorio:

Urbo Lodz - Kurso de Esperanto por komencantoj – 8 personoj, aĝo de lernantoj 13-60 jaroj, neoficiala kurso en kulturdomo, lernolibro – „Esperanto per rekta metodo” S. Marcek, 2 horoj semajne, daŭro: 9 monatoj.

Aliaj polaj E-kursoj troviĝas ĉe <edukado.net>

(Raportis Magdalena Tatara)

Rumanio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Rumana ILEI-Sekcio

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Sectia Romana a ILEI

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1997/1998

Jura statuso: ne

Rilato kun Landa Asocio de UEA: en kunlaboraj rilatoj kun EAR; kelkaj ILEI-membroj agadas ankaŭ kiel membroj en aliaj enlandaj E-Asocioj; la sekciestro estas ankaŭ la nova prezidanto de EAR, tiel ke la kunlaborado estas pli bona

Membro-nombro fine de 2011: Sume: 18, detale: paperaj 1, retaj 17, aliaj (HM,DM) 0.

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 2

Oficiala hejmpaĝo: ne

Oficiala ret-adreso: mihaitrifoi@yahoo.com

Retgrupo: ne

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrotizo:

Nuna estraro de la sekcio: estro Mihai Trifoi, Str.Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud.Covasna, mihaitrifoi@yahoo.com

=== Agado ===

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

- semajna kurso de Esperanto en Brașov;
- kunlaboro kun la brașovaj esperantistoj por la organizado kaj realigado de la 83-a SAT-Kongreso okazinta en la urbo Brașov, en Rumanio.

Propraj projektoj dum 2011:

- publikigo, per propraj fortoj, de la libreto "Elemente de esperanto pentru romanofoni" de Ionel Onet

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

- Projekto "Esperanto 125"

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

- per serio de informartikoloj, en la rumana lingvo, pri Esperanto kaj Esperanto-agado, artikoloj aperintaj en distrikta ĵurnalo;
- per enkondukaj kursoj kaj individuaj kaj kolektivaj diskutoj kadre de diversaj enlandaj e-renkontiĝoj;
- per retaj mesaĝoj.

Konata E-instruado en la teritorio:

- Okazis kursoj de Esperanto por komencantoj kaj progresantoj en la urboj Timisoara, Brașov, Baia Mare, Gherla.

Aliaj atingoj en 2011

- korespondado kaj solvo de la jaraj ILEI-taskoj;
- preparo, kunlabore kun EAR, por la 14-a EAR-Kongreso;
- organizado kaj realigado de la 14-a EAR-Kongreso (06-08.05.2011) en la urbo Sf.Gheorghe, kadre de kiu okazis ankaŭ simpozio kaj la renkontiĝo de la ilei-membroj de nia sekcio;
- partopreno en la 44-a Konferenco de ILEI (Kopenhago, 17-23.07.2011): komitatkunsidoj, simpozio, artaj aranĝoj, Internacia Lingva Festivalo;
- partopreno en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto (Kopenhago, 23-30.07.2011): saluto nome de la rumanaj esperantistoj, partopreno en la komitatkunsidoj de UEA kiel anstataŭanto, en TdL, en la EEU-kunsidoj;
- partopreno en la Esperanto Semajno – Kurso pri la Kosmologio de Martinus (Klint, 01-06.08.2011);
- partopreno en la jara renkontiĝo de AFER (Craiova, 14-16.10.2011): enkonduka kurso de Esperanto por 17 komencantoj; prezento de 6 libroj rilatantaj al Esperanto; verbaj diskutoj;
- partopreno en la 35-a Hungaria Esperanto-Kongreso (Szolnok, 03-06.11.2011) kaj en la Konferenco ILEI-HU, okazinta kadre de la Kongreso, dum kiu Stefan MacGill, la prezidanto de ILEI, prezentis la Projekton "Esperanto 125";
- partopreno, kun ekspozicio de esperantaj kaj tradukitaj libroj, en la Fojro de la Lokaj Metiistoj en Bixad (novembro 2011);
- publikigo de informaj artikoloj pri Esperanto en la distrikta ĵurnalo "Mesagerul de Covasna" ktp.

Serbio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: ILEI-Serbio

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011:

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo:

Oficiala ret-adreso:

Retgrupo:

Revuo sekcia:

Enlanda membrokotizo:

Nuna estraro de la sekcio: sekciestro Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, 32000
Čačak, radojica.petrovic.rs@gmail.com

=== Agado ===

(Ne raportis la laboron)

Svedio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: ILEI-Svedio

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011: 14

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012:

Oficiala hejmpaĝo: <http://ilei.info/svedio/eo>

Oficiala ret-adreso:

Retgrupo: ne

Revuo sekcia: ne

Enlanda membrotizo:

Nuna estraro de la sekcio: prezidanto Agneta EMANUELSSON, sekretario Fredrik OLOFSSON, Torkelstorpsvägen 248, SE-430 33 FJÄRÅS, kasisto Sten SVENONIUS, Inga JOHANSON, vickasisto, Stampgatan 60 B-127, SE-411 02 GÖTEBORG, +46 (0)31-15 57 23

=== Agado ===

La estraro de ILEI-SE raportas por la jaro 2011 la jenon:

La sekcio havis dum la jaro 14 membrojn.

La estarao konsistiis el Agneta Emanuelsson, prezidanto, Sten Svenonius, kasisto /sekretario, Bertil Nilsson, Haldo Vedin kaj Inga Johans. Bertil Nilsson kaj Haldo Vedin estis elektitaj kial anstataŭantoj sed fariĝis ordinaraĵoj estraranoj pro manko de tiaj.

La nekontentiga zorgado pri la sekciaj aferoj kulminis dum la jarkunsido en majo kunlige kun la kongreso de Sveda Esperanto-Federacio en Stokholm. Pro nesufiĉa partopreno de estraranoj kaj nesufiĉa preparo por estonta agado la jarkunsido decidis prepari proponon pri malfondo de la sekcio kiel memstara organizo kaj du novelektitaj estraranoj starigis sin je dispono por kune kun la restantaj malnovaj estraranoj dum efektivigi la decidon. La ideo celis krei laborgrupon ene de SEF kun rekta membreco de ILEI por interesitoj.

En julio la ILEI-konferenco okazis en Kopenhago kun partopreno de Agneta Emanuelsson kaj Sten Svenonius. La vigla kaj sukcesa konferenco donis novan entuziasmon al ili tamen vivigi la svedan skucion kaj diskuto pri tio kaj novaj labormetodoj okazis dum la aŭtuno. Daŭre la risko por malfondo ŝvebas super la sekcio. Finfine la membroj de la sekcio devos decidi pri tiu demando dum la jarkunsido en Helsingborgo en majo 2012.

La ekonomia kaj revizora raporto estas donitaj aparte.

Malmo en februaro 2012

Agneta Emanuelsson, Sten Svenonius, Bertil Nilsson, Haldo Vedin kaj Inga Johansson.

Svislando



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Svisa ILEI Sekcio (SIS)

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1974/1974

Jura statuso: Asocio laŭ svisa juro

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2011: 16

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 2

Oficiala hejmpaĝo:

Oficiala ret-adreso:

Retgrupo:

Revuo sekcia:

Enlanda membrototizo:

Nuna estraro de la sekcio: prezidanto – Mirejo Grosjean Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets, mirejo.mireille@gmail.com, sekretario – Francisko Randin

=== Agado ===

JARRAPORTO 2011

Skribas la prezidanto de Svisa ILEI Sekcio (SIS) Mirejo Grosjean. Mi estis profesie fremdlingvoinstruistino dum 38 jaroj. Mi ankaŭ estas kun-prezidanto de Svisa Eo-Societo (SES).

SIS havas du membrojn en la Komitato de ILEI: Jean-Thierry von Büren kaj mi. La membronombro de SIS estas 16. En Svislando ni havas elstaran pedagogon, sinjoron Claude Gacond. Li agadas, arkivas, organizas seminariojn, en CDELI, Centro pri Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia en La Chaux-de-Fonds en la urba Biblioteko. Li farighis 80-jara kaj okazis honore al li granda festo sabaton la 27an de aŭgusto 2011. Gacond estas honora membro de SES, de ILEI kaj de UEA. Nun li transdonis la taskon de la studsabatoj al tri kunlaborantoj: Monika Molnar, Luko Allemand kaj Nancy Fontannaz. Tiuj studsabatoj okazas unufoje monate sub la aŭspicioj de SIS.

Kunlaboras porokaze Nicole Margot, Stefano Keller kaj mi laŭbezone.

Mi estas en regula kontakto kun la membroj de SIS. Kvin svisoj estas membroj de IRE: Internacia Rajtigita Ekzamenantaro. Du membroj de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) loĝas en Svislando : Monika Molnar kaj mi.

Okazas eo-kursoj en privata lernejo « La Granda Ursino » en La Chaux-de-Fonds. Ne estas aliaj kursoj krom en la lokaj kluboj. Okazis prezento de esperanto plurfoje dum tutsvisa « festivalo pri lertigado » (festival de la formation en fête).

Nova agado estas la laboro de Luko Allemand, kiu tre regule zorgas pri la kalendaro sur la retejo de Svisa Esperanto Societo. Tie aperas la kursoj en CDELI. Tiel alvenis novaj studentoj al la Studsabatoj. Kutime la membroj de SES ricevas informilon pri la Studsabatoj. Sed tio ne sufiĉas. Pro tio mi faris afiŝojn pri la Studsabatoj kaj gluis ilin en diversaj lokoj en la regiono de La Chaux-de-Fonds. Tiel alvenis novaj studentoj al la Studsabatoj.

Nova agado okazis : per la helpo de la teamo de *lernu.net* mi povis sendi retmesaĝojn al ĉiuj gestudentoj de *lernu*. Post tri monatoj mi refaris la samon. Tiel ni povas resti en kontakto. Informon pri la studsabatoj ili ricevis kun diversaj informoj pri la esperanto-vivo en Svislando.

La 19an de novembro 2011 okazis Ĝenerala Kunveno de SIS en La Chaux-de-Fonds en CDELI. Okazis interesa ideointerŝanĝo.

Raportas Mirejo Grosjean, Les Brenets, 2012-03-03

Togolando



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Instituto de Esperanto en Togolando(TIET)

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Institut de Espéranto aŭ Togo (TIET)

Fondo/Aligo al ILEI:1992/1999

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA: TIET estas la eduka fako de la landa asocio UTE (Unuiĝo Togolanda por Esperanto)

Membro-nombro fine de 2011:5

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2011: 1/1 (ATTIOGBE-AGBEMADON Mensaf Biova)

Retejoj: triumfo.jimdo.com

Retgrupo:ne

Revuo: ONDO da VERO (OV), reta (3-monate) kaj papera(6-monate), redaktoro Parfo AJTO (kaŝnomo de GBEGLO Koffi).

Enlanda membrokotizo: KhK

Estraro: Respondeculo ATTIOGBE-AGBEMADON M. Biova; Ĝenerala Sekretario GBEGLO Koffi esp.togo@cafe.tg; Kasisto SAGBADJELOU Kokou <koksagba@yahoo.fr>

Mandato-periodo: 2 jaroj

=== Agado ===

AGADO DE TIETo en 2011

La laboroj de TIETo en 2011 konsistas el prizorgoj de la laboroj de IZo kaj ankaŭ la revizio de la eduka programo .

I- Instruado

La kursoj pluiris en IZo kaj ankau al unuopuloj per la metodo FERREZ.

Estis kurso en Glidji kaj Wogba kun ekzamenoj, kiuj okazis en tiuj lokoj post surloka kurso.

La organizado de la diversaj ekzamenoj okupis la prizorgantojn de TIETo. Estis decidite pri la ekzamenoj

1- naciaj ekzamenoj

Ili estas la ekzamenoj A kaj B.

2-Internaciaj ekzamenoj

Ili estas

a) La elementa kaj meza ekzamenoj de ILEI. Ili okazis en julio 2011

b) La ekzamenoj de ACE

II- Utiligado

TIETo helpis al UTE en la organizado de la komitatkunsidoj. Ĝi serĉis materialon por la kvizo de la 19a TEK. Pluaperis la periodaĵo OVO rete kaj papere. La tuta laboro tiel iras, ĉar la TIETo-stabo kunvenis kvar fojojn en la jaro.

Ukrainio



Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Ukraina Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ULEI)

Nomo kaj mallongigo nacilingve: Українська Ліга Есперанто - Викладачів (УЛЕВ)

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 2000/2003

Jura statuso: Instru-metodika fako de UkrEA,

Rilato kun Landa Asocio de UEA: Integra parto

Membro-nombro fine de 2011: Sume:11. Detale: paperaj 1, retaj 10.

Nombro da rajtigitaj/nomumitaj komitatanoj por 2012: 1

Oficiala hejmpaĝo: <http://www.ulei.retejo.net>

Oficiala ret-adreso: volodomir@ukr.net, Volodimir Hordijenko - sekciestro de ULEI

Ni pretas permesi al la internacia ILEI dissendi rekte mesaĝojn al viaj membroj.

Revuo sekcia: UkrEA-informilo "Helianto"

Enlanda membro - kotizo: mankas

Nuna estraro de la sekcio: Sekciestro – Volodimir Hordijenko <volodomir@ukr.net>; Sekretario-Svetlana Pogorelaja:Kijiv-35,ab/k.54, UA-03035; Membro - Semen Vajnblat <seiv2004@mail.ru>. en 2011 kaj la unuaj 4 monatoj de 2012. La sekva jarkunsido okazos la 3-an de Majo 2012 en Jalto, Krimeo.

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: Post la 2012-kunsido la mandato-periodo estos dum 3 jaroj.

=== Agado ===

Propraj aranĝoj dum 2011:

Okazis ULEI-kunvenoj en Jalto, la 3-an de majo kaj en Kijivo, la 13-an de novembro, 2011.

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

Kadre de E-festivalo "Aroma Jalto-2011" okazis 2-nivelaj

E-kursoj, sub gvido de Tatjana Auderskaja, Svetlana Pogorelaja.

En novembro en Jalto estis realigita lingva festivalo, kun la konkurso de tradukistoj, Jefim Zajdman.

En la Universitato de la tria aĝo (por emeritoj) Kijiv, estas instruata Esperanto fare de S.Pogorelaja.

Propraj projektoj dum 2011:

Estas preparata programo de la lingvo Esperanto por specialigitaj lernejoj, gimnazioj kaj liceoj, V.Hordijenko, R.Roman.

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

Kadre de la Ago-monato okazis prelegoj en Kijiva Lingvistika Universitato, V.Hordijenko

Kadre de Kijiva Esperanto-Semajno okazis prelegoj en Kijiva Pedagogia Universitato kaj Kijiva Nacia Universitato, V.Hordijenko

Kadre de la lingva festivalo en Jalto estis prezentita Esperanto, J.Zajdman


Konata E-instruado en la teritorio:

Kursgvidanto-Volodimir Viktoroviĉ Hordijenko,UA – Ukrainujo,Kijiv.

Elementaj E-kursoj okazis en Jalto sub gvido de Jefim Zajdman kaj Anĵela Belenko, en Kijiv

- Volodimir Soroka, en Odeso - Semen Vajnblat.

Usono kaj Kanado



Nomo kaj mallongigo en Esperanto:

AMERIKA ASOCIO DE INSTRUISTOJ DE ESPERANTO (AAIE)

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

American Association of Teachers of Esperanto (AATE)

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1959/1963

Jura statuso: Sendependa organizo por instruistoj de Esperanto en Usono kaj Kanado

Rilato kun Landa Asocio de UEA: kunlabora kun Esperanto-USA.

Membro-nombro fine de 2011: Sume: 47, paperaj 23, retaj 24, aliaj (HM,DM)?

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2012: 3

Oficiala hejmpaĝo: <http://aaie.us>

Oficiala ret-adreso: rglossop@mindspring.com, R. Glossop, Prezidanto de AAIE

Retgrupo: dgarygrady@frontier.com

Revuo sekcia: AAIE-BULTENO (papero kaj perrete), kvar fojojn jare, kutime 4 paĝoj.

Enlanda membrotizo: USD 40 por materialoj perpoŝte, USD 20 por materialoj elektronike

Nuna estraro de la sekcio: Prezidanto - Ronald Glossop, 8894 Berkay Avenue, Jennings MO 63136-5004 (U.S.)<rglossop@mindspring.com>; VicPrezidanto - Jeremy Aldrich <geremio@gmail.com>; Kasisto - Chuck Mays <charles.o.mays@gmail.com>; Koresponda Sekretario - Doroteo Holland <dorothyjeanh@gmail.com>; Eduka Sekretario - Sherry Wells <esperantosherry@tm.net>; Redaktoro de AAIE-BULTENO kaj Mastrumado de la retejo- Gary Grady <dgarygrady@frontier.com>

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: Post la 2012-kunsido la mandato-periodo estos dum 3 jaroj. La 2012 jarkunsido okazos je la 24a de Junio 2012 en Dalaso, Teksaso.

=== Agado ===

Propraj aranĝoj dum 2010:

La 2010-jarkunsido de AAIE okazis en Vaŝingtono DC je la 30-a de Majo 2010.

Kelkaj membroj instruas Esperanton en siaj domoj kaj en lernejoj, inkluzive de universitatoj.

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

La Eduka Sekretario faris prezentaĵojn ĉe kunvenoj de instruistoj de fremdaj lingvoj. La Prezidanto eldonis artikolon en IPR pri vizito al Ĉinio dum Aŭgusto 2010 kaj instruis Esperanton en sep lokoj dum kvin semajnoj en Ĉinio. Nia registaro malpermesis al ni partopreni en la ILEI-konferenco en Havano.

Propraj projektoj dum 2011:

La 2011-jarkunsido de AAIE okazis en Emeryville, Kalifornio (apud Sanfrancisko) je la 19-a de junio 2011. Ni voĉdonis ŝanĝi nian statuton laŭ la petoj de ILEI.

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

La Eduka Sekretario faris prezentaĵojn ĉe kunvenoj de instruistoj de fremdaj lingvoj.

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

De tempo al tempo niaj membroj parolas al studentoj en lernejoj kaj universitatoj.

Konata E-instruado en la teritorio:

Vidu ĉe <edukado_net>

Aliaj atingoj en 2011

Prezidanto Glossop prelegis en Kopenhago ĉe la ILEI-konferenco kaj dum la Tago de la Lernejo dum la UK. Teksto de tiu prelego aperis en IPR 2011/4. Kvar AAIE-membroj partoprenis la ILEI-konferencon.

Kun koraj dankoj al niaj sekciestroj pro rekorda raportado, kaj al ĉiuj, kiuj kontribuis al nia land-nivela agado tra la jaro!

La Estraro de ILEI